

ESPERANTO

— — — — —
LINGVO INTERNACIA

~~~~~  
EKZERCO JE TRADUKADO



VALENCIA  
IMP. DE MANUEL ALUFRE

1903

6719



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

## EKZERCO JE TRADUKADO

# ESPERANTO



LINGVO INTERNACIA




EKZERCO JE TRADUKADO



VALENCIA

IMP. DE MANUEL ALUFRE

1903





# LA FEINO

## FABLO

Vidvino havis du filinojn. La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj visaĝo, ke, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinojn; ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili. La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj kiujn oni povis trovi.

---

Feino, *hada, bruja*. Fablo, *cuento*. Vidvo, *viuda*. Simila, *semejante*. Visaĝo, *cara, rostro*. Fiera, *altanero*. Povi, *poder*. Portreto, *retrato*. Laŭ, *por*. Krom, *fuera de, excepto*.

Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li, tial tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en la sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna. Ŝi devigis ŝin manĝi en la kuirejo kaj laboradi senĉese. Inter aliaj aferoj tiu ĉi malfeliĉa infano devis, du fojojn en ĉiutago, iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko kaj alporti domen ple-nan grandan kruĉon.

En tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino, kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki. «Tre volonte, mia bona», diris la bela knabino. Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto, kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, por ke la virino povu trinki pli oportune. Kiam la bona virino trankviligis

---

Varmege, *ardorosamente*. Sama, *mismo*. Teruro, *terror*. Kuri, *cocer*. Senĉese, *sin cesar*. Inter, *entre*. Alia, *otro*. Fojo, *vez*. Ĉerpi, *sacar agua*. Domen, *à casa*. Kruĉo, *cántaro*. Apud, *junto á*. Oportuna, *cómodo* Trankvila, *tranquilo*.

sian soifon, ŝi diris á la knabino: «Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon» (ĉar ŝi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino.) «Mi faras al vi donacon», daurigis la feino, «ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono».

Kiam tiu ĉi bela knabino venis domen, ŝia patrino insultis ŝin, kial ŝi revenis tiel malfrue de la fonto. «Pardonu al mi, patrino», diris la malfeliĉa knabino, «ke mi restis tiel longe.» Kaj kiam ŝi parolis tiun ĉi vortojn, elsaltis el ŝia buŝo tri rozoj, tri perloj kaj tri grandaj diamantoj. «Kion mi vidas!» diris ŝia patrino kun grandega miro. «Ŝajnas al mi ke el ŝia buŝo

---

Soifo, *sed*. Donaco, *regalo*. Preni, *tomar*. Vilaĝo, *aldea*, *lugar*. Daurigi, *continuar*. Ĉe, *á*. Buŝo, *boca*. Multekosta, *precioso*. Frue, *temprano*. Longe, *largo tiempo*. Paroli, *hablar*. Vorto, *palabra*. Elsaltis, *brotaban*. Miro, *admiración*.

elsaltas perloj kaj diamantoj! De kio tio ĉi venas, mia filino?» (Ĝi estis la unua fojo ke ŝi nomis ŝin sia filino.) La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis al ŝi, kaj, dum ŝi parolis, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj. «Se estas tiel», diris la patrino «mi devas tien sendi mian filinon. Marinjo, rigardu kio eliras el la buŝo de via fratino, kiam ŝi parolas; ĉu ne estus al vi agrable havi la saman kapablon? Vi debas nur iri al la fonto ĉerpi akvon; kaj kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos ĝin al ŝi ĝentile».

«Estus tre bele», respondis la filino malĝentile, «ke mi iru al la fonto». — «Mi volas ke vi tien iru», diris la patrino, «kaj iru tuj». La filino iris sed ĉiam murmurante. Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo. Apenaŭ ŝi venis al la fonto, ŝi vidis

---

Nomi, *nombrar*. Naiva, *sencillo*. Okazi, *suceder*. Elfali, *caer de*. Rigardi, *mirar*. Kapabla, *capaz*. Arĝento, *plata*. Vazo, *vasija*. Loĝejo, *habitación*.



unu sinjorinon, tre riĉe vestitam, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki. (Tio ĉi estis tiu sama feino, kiu prenis sur sin la formon kaj la vestojn de princino, por vidi kiel granda estos la malboneco de tiu ĉi knabino.) «Ĉu mi venis tien ĉi», diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, «por doni al vi trinki? Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por doni trinki al tiu ĉi sinjorino! Mia opinio estas: prenu mem akvon, se vi volas trinki». — «Vi tute ne estas ĝentila», diris la feino sen kolero. «Bone, ĉar vi estas tiel servema, mi faras al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto kiun vi parolos eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano».

Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis, ŝi kriis al ŝi: «Nu, mia filino!» — «Jes, patrino», respondis al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon. — «Ho ĉielo» ekkriis la

---

Tute, *totalmente*. Kolero, *cólera*. Servema, *servicial*. Rimarki, *echar de ver, notar, divisar*. Nu, *hola!* Jes, *si* Elĵeti, *arrojar*.

patrino, «kion mi vidas? Ŝia fratino en ĉio estas kulpa; mi pagos al ŝi por tio ĉi!» — Kaj ŝi tuj kuris bati ŝin.

La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej proksima arbaro. La filo de la reĝo, kiu revenis de ĉaso, ŝin renkontis; kaj vidante ke ŝi estas tiel bela, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola, kaj pro kio ŝi ploras. — «Ho ve, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo».

La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie tio ĉi venas. Ŝi racontis al li sian tutan aventuron. La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon ol ĉio kion oni povus doni dote al alia fraŭlino; kaj forkondukis ŝin al la palaco de sia patro la reĝo, kie li edziĝis je ŝi.

---

Kaŝi, *ocultar*. Reĝo, *rey*. Ĉaso, *caza*. Demandi, *preguntar*. Ho ve!, *ay!* Domo, *casa*. Kelke da, *algunos*. Indo, *mérito*. Dote, *dotalmente*, *en dote*. Edziĝi, *desposarse*. Je, *sustituye á cualquier preposición*.

Sed pri ŝia fratino ni povas diri, ke ŝi fariĝis tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de ŝi; kaj la malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro.

## FINO



## DU DRINKULOJ

### OKAZINTAĴO

Post longa drinkado du instruitaj taglaboristoj, kies pensado estas iom malklarigitaj de la alkoholaj vaporoj, eliras de drinkejo kaj marŝas sendirekte sur la stratoj de la bela urbo *Sevilla*. apogante sin reciproke kaj interparolante hautvoĉe.

Subite, unu el la drinkuloj haltas kaj diras:  
—Auskultu, kolego; ĵus ekfrapis al mi granda ideo.....

---

Post, *después*. Taglaboristo, *jornalero*. Marŝi, *andar*, *marchar*. Halti, *hacer alto*. Ĵus, *ahora justamente*.

—Kia estas? Demandas kun multa scivolemo la alia drinkulo.

—Mi ekkredas ke ni povos tre bone alporti, trapuŝante per niaj manoj, turon Giraldan ĝis la rivero Guadalquiviro.

(Turo Giralda estas malproksime je kelkaj kilometraj de la rivero Guadalquiviro.)

—Ĉu vi volas moki min? Bela ideo... Ĉu vi estas sufiĉe forta por sukcesi je tia entrepreno? Pripensu, estimata amiko.

—Malkuraĝulo! Se mi havus nun la levilon de Arkimedeso, mi levus ne la teron sed ĉiujn la mondojn eksistantajn.

—Eble vi estas prava, diris la malkuraĝa laboristo, iom konvinkita de l' argumento de sia kuniradanto.

—Kompreneble.

Scivolemo, *curiosidad*. Puŝi, *empujar*. Turo, *torre*. Rivero, *rio*. Moki, *burlarse*. Sukcesi, *salir airoso*. Entrepreno, *empresa*. Malkuraĝulo, *cobarde*. Vi estas prava, *tienes razón*.

Kaj sen aliaj klarigoj la drinkuloj entusiasmplenaj piediras rapide por atingi la ĉarman turon. Post du horoj la du kolegoj apudestas je la turo Giralda.

La vetero ne estas varma sed varmega, kaj la du taglaboristoj prave decidas ripozi dum kelkaj minutoj, antaŭ efektiviĝi sian entreprenon.

Poste, por labori pli oportune, ili fortiras siajn kitelojn, kiujn metas sur ŝtonon proksiman kaj ekpuŝas per siaj manoj la turan muregon.

Dum tia okupo, aperiĝas knabo kiu tuj komprenante la aferon, ŝtelas lerte kaj rapide la kitelojn de la drinkuloj, kiuj, distrataj de sia manlaborado, ne vidas la knabon, kiu rapide malaperiĝas kunportante la vestaĵojn.

---

Klarigo, *explicación*. Atingi, *alcanzar*. Ĉarma, *encantador*. Vetero, *temperatura, tiempo*. Dum, *durante, mientras*. Fortiri, *sacar*. Kitelo, *blusa*. Meti, *poner*. Aperiĝi, *aparecer*. Afero, *negocio*. Ŝteli, *robar*. Lerte, *con cuidado*.

Pasas du horoj, sed la drinkuloj forpuŝas senĉese.....

Subite, unu el la forpuŝantoj, lacigita de la duhora penado kaj svitante, demandas:

—Nu! Mi kredas ke la turo Giralda devas esti tre proksima de la rivero, ĉu ne certe?....

La alia drinkulo, malantaŭen turnas sian kapon kaj ekkrias tre serioze:

—Jes, kolego; nia forpuŝado multe progresis, ĉar ni ne vidas plu niajn kitelojn.

## FINO

Eltirita el la gazeto hispan-americana *Esperanto*, n.º 4.

---

Lacigita, *cansado*. Penado, *trabajo*. Svitante, *sudando*.

## ELEMENTOS PARA SU ENSEÑANZA

---

|                                                                               | <u>Plas.</u> |
|-------------------------------------------------------------------------------|--------------|
| Gramática. . . . .                                                            | 4            |
| Cuadro de palabras correlativas. . . . .                                      | 0'10         |
| Enumeración de los afijos. . . . .                                            | 0'25         |
| Ejercicio de traducción. . . . .                                              | 0'50         |
| Número suelto de la revista internacional<br><i>Espero Katolika</i> . . . . . | 0'25         |

---

## ESCUELAS PÍAS DE VALENCIA

**R. P. Antonio Guinart.**